Bimestriel culturel d'information & d'expression espérantiste
Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista. La n°:2FF
N° 21 (39) Aŭgusto-Septembro 1979.
ISSN 0150-5823




Eldonas: Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE
Poŝtkonto: 3 371 74 M Bordeaux

Abono por unu jaro : 12 FF
(10 FF por Francio)
al la ĉi-apuda pĉk.

************************************************************

V I R I N O J
M A L S A T S T R I K A S
K O N T R A Ŭ A T O M A R M I L O J

*************************************

Deko da virinoj de la movado "Virinoj por Paco" publike fastas ekde dimanĉo la 5a de aŭgusto matene ĝis ĵaŭdo la 9a de aŭgusto vespere antaŭ la katedralo de Strasburgo. Venintaj el Francio, Svisio kaj Aŭstrio, tiuj aktivantinoj volas atentigi la publikan opinion pri la problemo de atomarmiloj. Dum tiuj tagoj, kiam revenas la tago de la ĵetado de la unuaj atombomboj sur urbojn Hiroŝima kaj Nagasaki, la movado "Virinoj por Paco" volas denunci la absurdecon de vet-armado, la kriman elspezadon por tiu vetarmado. Intence la "Virinoj por Paco" elektis Strasburgon, urbon, kie kunvenas la Eŭropa Parlamento kaj la Kortumo por Homrajtoj, por fari tiun agadon, kaj ankaŭ Hagon, kie kunvenas la internacia Justica Kortumo, kaj kie aliaj aktivantinoj nun faras similan agadon. La "Virinoj por Paco" alvokas al ĉiuj virinaj energioj por krei vastan movadon kontraŭ armado kaj militistigado. Dum

tiuj tagoj, ili turnas sin speciale al la kristanoj kaj ties eklezioj por peti ilin solene kondamni atomarmilojn.

La du unuaj fastotagoj antaŭ la katedralo forpasis senprobleme. La aktivantinoj spertis neniun malamikan reagon ; male, ili povis ekdiskuti kun multaj vizitantoj kaj pasantoj, ĉefe kun junuloj.

Ni memorigas, ke la "Virinoj por Paco" agnoskas la ekziston de konfliktoj, sed kontestas la rimedojn nuntempe uzatajn por ilin solvi. Ili opinias, ke konfliktoj povas solviĝi per neperfortaj rimedoj respektantaj kaj favorantaj la vivon.

Merkredon la 8an de aŭgusto okazos je la 20a horo kaj 30 debatvespero en la preĝejo de sankta Nikolao en Strasburgo, kun montro de la filmo de UNO pri "nuklea minaco", kiu rakontas la historion de atomarmiloj kaj montras la ligon inter pormilita kaj civila uzo de atomenergio.

Nouvel Alsacien, 79/08/07,
elfrancigis Ĵakvino.

************************************************

Debatoj per cirkulantaj leteroj inter abonantoj de "Laŭte!" :

Tio estis iniciatita kaj tuj ekfunkciigita okaze de la E-semajno en Bovilo fine de julio. La unua debato (pri "Ĉu estonteco por esperanto?") aperos ekde la oktobra numero de "Laŭte!".
Kompreneble, la korespondrondo estas malfermita al ĉiuj. Kiu volas pridiskutigi temon, tiu sendu enkondukon pri la temo al la sidejo de "Laŭte!", kiu cirkuligos ĝin inter la korespondemuloj.
Kiu preferos partopreni, leginte la diversajn vidpunktojn en la bulteno, tiu sendu sian kontribuon rekte por tuja apero.
Tiu korespondsistemo ne estas nova. Ĝi estis sukcese uzata dum jaroj en "La Juna Penso". Ni esperas, ke ĝi donos al la legantoj de "Laŭte!" plian eblecon por sin esprimi.

Laŭte.

---

La venonta numero aperos fine de septembro !



## ARMEO kaj ESPRIMLIBERO

## en FRANCIO

En Francio, estas nenia rajto de libera esprimo en la armeo, kontraŭe al Okcidenta Germanio kaj Nederlando, kie tiun rajton la leĝo agnoskas kaj ja respektas.

Tia misfaro larĝe klarigas la nunan krizon, kiu vastiĝas en la franca armeo, kie kolektivaj peticioj,petantaj nur senpagon de la trafikiloj, estas severe punataj.

Tial la soldatoj estas truditaj alvoki civilajn aktivulojn por diskonigi siajn informojn kaj kritikojn pri la militista organizo. Kaj ankaŭ tiuj simpatiantaj civiluloj estas akuzataj, kvankam ili agas nome de fundamenta rajto de la civitanoj.

<u>Pri kelkaj okazaĵoj</u> : Ekde somero 1976, por ne pli fruen retroiri, turmentoj kaj punoj kontraŭ soldatoj kaj interpelacioj de civiluloj sin intersekvis en Savojo, pro disdono de tekstoj kritikaj pri la armeo.
Ekz., je la 3a de aŭgusto 1976, ĉ. 10 identecoj estis registritaj en la ĝendarmejo pro disdono de teksto en la ĉamberia stacidomo , sed sen posta kulpigo. Sed poste, pro alia disdono, nur Jean Berard, urba konsilanto, estis kulpigata.
Alia ekzemplo : fine de oktobro 1976, konskripta soldato (antaŭe aktivulo de CGT) kaj du el liaj kamaradoj estis trafitaj per 60 tagoj da senlibero, kaj tuj forsenditaj de Le-Bourget-du-Lac (apud la samnoma lago) al Aix-en-Provence.

<u>Kulpigoj</u> : Por signo de solidareco kun Jean Berard, la sama teksto estis disdonita en la ĉamberia sabata foiro, la 10an de februaro 1979, sed tiun fojon oni avertis la ĝendarmojn. Kvardekon da nomoj ili enskribis. 36 el tiuj personoj estis kunvokitaj de la enketa juĝisto la 30an de majo en la urbodomo de Ĉamberio (Chambéry) kaj li kulpigis ĉiujn pro tri motivoj :
- insultoj kaj kalumnioj kontraŭ la armeo ;
- instigoj malobeigi soldatojn ;
- disdono de teksto sen mencio pri presisto.

Poste okazis novaj manifestacioj de solidareco : 2 novaj disdonoj de la teksto (vere simbolaj, ĉar restis nur kelkaj ekzempleroj) :

- 9an de junio : 23 nomoj registritaj de la ĝendarmoj.
- 20an de junio : post 2 telefonaj alvokoj, la ĝendarmoj malkonsentis veni kaj registri identecojn. Ĉ. 20 homoj sendas leteron, postulante sian kulpigon.

Kreado de apogkomitato : Post peto de la 36 gejuĝotoj de la 30a de majo, la ĉamberia komitato de la Ligo por Homrajtoj kaj maltrankvilaj gecivitanoj okazigis, la 5an de junio 1979, gazetaran kunvenon en la ĉamberia urbodomo (kiel la juĝisto) kaj sciigis estigon de apogkomitato al Jean Berard kaj al la 36 geakuzitoj de la 30a de majo. Ili alvokis al tiu apogkomitato ĉiujn asociojn, movadojn, gecivitanojn emajn defendi la esprimrajton, fundamentan rajton en demokratio, ankaŭ por soldatoj.

Aprobante tiun agadon, oni ne aprobas la enhavon de la disdonita teksto, sed oni montras sian firman volon permesi diskonigi ĉies opiniojn.

Du el la 36 kulpigitoj estas esperantistoj. Interesa apogo de la esperantistaro estos sciigi al ni la staton de la esprimrajto (precipe en armeo) en ĉiu lando. Oni povas subteni ankaŭ per mono. Jen nia adreso :

Ligue des Droits de l'Homme
17 rue Jean-Pierre Veyrat
F 73000 CHAMBERY (Francio)

***********************************************************

Anonceto : Junulo, naskita en Brest antaŭ 25 jaroj kaj enkarcerigita en Muret (31) por pluraj jaroj, deziras interŝanĝi ideojn kun persono(j), kiu(j) interesiĝas pri Esperanto kaj internaciaj rilatoj. Li baldaŭ studos sociologion, li konsideras Esperanton kiel ilon por socia-politika agado kaj volas scii pli pri ĝia ideologia enhavo. Regula korespondado, ebligante al li pripensi kaj kompari sian penson kun alies, helpus lin en lia klopodo eskapi la stultigecon, infanaĉigecon kaj malresponsigecon de sia medio.

Laŭ la dekretoj kompletigantaj la leĝaron pri pura proceduro,

- franca malliberulo rajtas korespondi nur en franca lingvo, ĉar ĉiu letero alveninta aŭ sendata estas kontrolata de la karcera cenzuro.
- kondamnito povas ricevi la permeson korespondi kun persono ekstera al sia familio, kaj tiu persono povas ricevi la permeson lin viziti en la parolejo.

Laŭ scio de Ĵaklino, la instancoj de la malliberejo de Muret havas sufiĉe kompreneman interpreton de la reguloj, kaj principe ne malaprobas enkondukon de Esperanto en la malliberejon. Kiu deziras sin devontigi por regula korespondado kun tiu malliberulo povas skribi al :

Thierry LE DOARE, 2788, B.211, B.P. 312, F 31600 MURET.



*************************************************************

## A L V O K O al B O N K O N S C I E N C U L O J

Hodiaŭ multe pli ol hieraŭ, ne devas esti lukto mia, sed lukto de 36 000 aliaj viroj, kiuj mortaĉas en la publikaj rubejoj de via bona konscienco. Ili mortaĉas pro soleco kaj humiliĝo. Tuj post la pordo de la malliberejo, ili perdas sian homecon. Malliberejo devus esti nur loko por forigo el la socio, sed neniam loko por mistraktado per detruado morala, korpa kaj psika de homo. Malliberejo transformas nin al sovaĝaj bestoj...

Mi komprenis, ke la homoj, kiuj iras sur stratoj, ŝajne ne ekzakte scias, kio estas la Kvartaloj por Alta Sekureco (franclingve QHS). Mi denuncas hodiaŭ la torturon, kiun mi tie suferis. Tuta izolado detruas tiom forte, kiom pafo, aŭ kiom koncentrejoj.

Kiu estos la venonta etapo ? Ŝajnas, ke juĝistoj kaj ministro pri justico - fiverkinto de la libro "Franca Malbono" - opinias, ke ne devas ekzisti limoj por ni, marĝenaj grandaj banditoj. Por kiuj eksperimentoj ni estas pretekstoj ?

Mi akuzas niajn regantojn ! Tiuj moŝtoj kun bonaj intencoj plene kontentigas vin, homojn kun bonaj konsciencoj, kiuj estas kontraŭ mortpuno ! Pro demagogio, ili ĝin abolos... sed tio estos nur polvo en la okulojn, ĉar ekde 1974 ili starigis la anstataŭon de mortpuno : la Kvartalojn por Alta Sekureco...

En tiuj mortkvartaloj regos leĝa murdo. Oni memmortigos ties klientojn ! Tiuj, kiuj havos sufiĉe da kuraĝo por elteni longan suferadon en tiu surtera infero, tiuj eliros vivantaj... Sed en kia stato korpa kaj mensa ?

Mi, kiu estis unu el la prabestoj de kvartalo por alta sekureco, havas mizeran mensostaton dum la tuta tago. Vole mi preterlasas rakonton de ĉiuj porscivolemulaj detaletoj de mia suferado malantaŭ la altaj muroj de honto. Mi ne skribas ĉi

tiun tekston por kanajligi la legantojn, nek havigi al ili fortajn sensaciojn, kiuj metus ilin en la facilan situacion de videmuloj.

Mi, kiu estis solulo, angoras en soleco, mi deziras varman ĉeeston ! Mi bezonas orelon, novan, moralan varmecon... Mi, kiu timis morton, emas al memmortigo.

Homoj de la socio
Kiuj bone elektis
En via nomo mi estis kondamnita
Kun bona konscienco
Vi fariĝis kunkulpantoj
Pri tiuj mortkoncentrejoj
La Kvartaloj por Alta Sekureco.

Ekde la komenco, mi skribas
Kun malamo kaj sen respekto
Al ĉio, kio min ĉirkaŭas.
Mi vomas sur paperon
Tion, kion mi devus vomi en kuveton !
Sed mi volas, ke vi sentu vian merdon,
Vi kunkulpantoj de multaj niaj problemoj.
Nome de via fekodora moralo
Mortaĉas homoj en tiuj kraĉujoj
La malliberejoj.

Murdantoj, kunkulpantoj de la justico, vekiĝu ! La gazetaro toksas vin... Ĝi transformas vin al murdantoj... Rigardu viajn manojn... Ĉu sur ili vi ne vidas sangon ?

Ekde kiam mi estas ekstere, mi plu sentas min en malliberejo. Fakte, karcera infero estis malfacile eltenebla, sed libero estas ankoraŭ pli malfacile alfrontebla.

Vi, homoj, kiuj iras sur stratoj, vi similas miajn juĝistojn, miajn gardistojn. Kiam mi aŭdas vin, kiam mi rigardas vin vivi - v laboristojn, studentojn kaj aliajn - mi emas krii al vi mian malamon, ĉar vi estas ĉiuj akuzistoj.

Ĉu vi ne vidas mian rigardon, kiu krias al vi : "Helpon" ? Miaj ventraĵoj doloras, kiam mi vidas vin vivi !

Eĉ vi, ribelululoj, ne estas tute honestaj kun vi mem : vi plu vidas nian pasinton, la etikedon, kiun via justico gluis sur nin. Vi masturbas vin per viaj kapoj, vi elĵetas kiel spermon viajn parolojn odorantajn je kompato kaj karitato. Ne tion ni deziras. Ni volas esti amataj, esti feliĉaj ! Ni volas ĉefe la konfidon, kiu estos nia savbuo por vivi alian



vivon. Sed ĉio tio estas malfacila : vi timas vin malpurigi... Ĉu vi ne vidas, ke vi estas pli malpuraj ol ni, klientoj de via justico, de viaj malliberigaj rubejoj ?

Vi ĉiuj estas policistoj, juĝistoj kaj akuzistoj ! Eĉ vi, bonkonscienculoj maldekstraj kaj ekstreme maldekstraj ! Vi ploras pri la mizero de tiu mondo, ĉar vi estas malkomfortaj en via haŭto, ĉar ankaŭ vi volas vivi alian vivon ! Tial mi krias al vi "Helpon!", sed ĉefe ne helpu por doni al vi bonan konsciencon... Fakte estas nek bona nek malbona konscienco, nur estas malfeliĉaj konsciencoj ! Helpu ankaŭ per ribelo kontraŭ viaj estroj, kiuj trompas vin, kiuj igas vin kunkulpantoj de iliaj krimoj... Tiel eble ni havos nian sunradion en nia ĝangalo.

Mi ne devas lasi min trompi de tiuj, kiuj montras sentimentecon : se mi falas en tiun kaptilon, mia lukto falas al la akvo ! Kaj la karcera universo ĉiam restos tiu loko, kie oni murdas homojn !

Ankaŭ veras, ke mi emas al amo, al sentimentoj... sed mi ne rajtas, ĉar mi riskas trompiĝi !

Mi kapablas romantikan konduton, mi kapablas plori al mia patrino... mi tamen ne devas tion montri, ĉar tio estus konfeso pri malforteco... Mi fakte estas kiel ĉiuj homoj : malforta... Sed mi ne devas montri mian veran vizaĝon, se mi volas gajni la lukton de tiuj 36 000 viroj, kiuj volas vivi belan sonĝon, vivi amon kaj la statuton de homo!

Mi faras mian eblon por teni tiun peceton da libero, kiun oni konsentas al mi. Per fronta atako al juĝistoj kaj malliberistoj sur ilia tereno, la publiko metos kelkajn demandojn pri "la rubujoj de sia bona konscienco".

La justico misuzas vian fidon kaj vian bonan konsciencon. Se la homo, kiu iras sur la stratoj, kaj ĵurianoj klare scius ke - de kvin jaroj - ili estas kunkulpantoj de vera mortpuno - la kvartaloj por Alta Sekureco - eble la verdiktoj estus aliaj ?

Tial mi alvokas al vi, kiuj legos tiun ĉi tekston. Subtenu min je la malsatstriko, kiun mi baldaŭ komencos... Tamen mi amas vivon ! Sed iun aferon mi ne konsentos : kurbi min antaŭ iu ajn !

Necesas, ke la justico konsentu pri niaj postuloj... la publika opinio devas kompreni, kie estas la murdantoj !

Mi volas ĉefe, ke la opinio komprenu, ke la plej grava krimo, pri kio ĝi kunkulpas, estas konsenti la ekziston de la Kvartaloj por Alta Sekureco. Viroj kaj virinoj, kiuj tie troviĝas, estas murdataj mense kaj korpe.

Oni ĉefe ne venu por diri al mi, ke mi ne estas sincera, ke mi agas pro emo al persona reklamo !

Mi metas mian vivon sur la pesilon de la justico, kaj mi restos senmona ĝis la fino de tiu ĉi lukto. La socio devos konsenti sian respondecon kaj ne konduti malkuraĝe.

Georgo.

(Aperinta en franca lingvo en la numero 22 de "CRI-Informations", 9 rue M.Blondel, F 21000 DIJON).

*****************************************************************

Ĉar ĉiuj kontribuantoj vetis, ke Laŭte 21 estos eĉ pli malgaja ol Laŭte 20, jen plia funebraĵo :

MIA TESTAMENTO
****************

Miajn dezirojn bonvolu plenumi.

Precipe - mi vin petegas,
ne min enterigu.
Bruligu mian korpon
neniam plu utilan
kaj ĵetu ĝiajn cindrojn
meze de l'riverfluon,
aŭ lasu ilin disporti
de granda vento.
Ne verŝu plorojn,
ne plu estas momento.
Donu la prezon de floroj
por tiuj infanetoj,
kiuj ne estas amataj.
Se eblas, el mia korpo donu,
kio estas utila por savi
aliajn homojn.
Tiel mi volas malaperi,
senbrue.

Odette Woock

(Association crématiste de Picardie)
(Pikardia kremaciista Asocio)

*****



L A   M I S T E R O   D E   A T E I S T A
****************************************

P R O P A G A N D O (II) (vd. Laŭte 20.)
********************

C) konfuzo inter ateismo kaj kontraŭkatolikismo

Ekde mia aliĝo al SAT, mi atente legis ĉiujn artikolojn, broŝurojn, ktp, pri ateismo, kiuj aperis en tiu asocio, ĉar kristanoj plej ofte ŝatus kompreni, kio estas ateismo. Mi konstatis kun granda miro, ke krom maloftaj esceptoj, kiel la Etiko de Kropotkin, ĉiuj skribaĵoj pri ateismo, kiuj aperis ĉe SAT, havas nur unu temon : la katolika eklezio. Neniam, en ĉio, kion mi povis legi, oni parolas pri io alia. Ĉar mi estis sufiĉe longe katolika, mi estas jam sufiĉe bone informita pri tiu temo, kaj, ĉar mi eksiĝis el la katolika eklezio pro motivoj kristanaj, mi ne bezonas, ke la ateistoj konvinku min ne plu iri al la meso.

Mi solene alvokas al ĉiuj ateistoj, kiuj legas Laŭte : gekamaradoj, ĉu iu el vi konas broŝuron, aŭ eĉ artikoleton, ĉu en Esperanto, ĉu en la germana, ĉu en la franca, ĉu en la angla, ĉu en la hispana, ĉu en la itala, en kiu oni klarigas pozitive al la leganto, en kio konsistas ateismo ? Mi apartenas de pluraj jaroj al tutmonda asocio, en kiu, krom kelkaj kristanaj stranguloj nekatolikaj, plus kelkaj homoj, kiuj kredas al diversaj formoj de dieco, troviĝas probable pli ol 1000 konvinkitaj ateistoj, kaj neniam mi povis ekscii, en kio konsistas ateismo, ĉiam oni klarigas al mi nur, en kio konsistas katolikismo. Ĉar mi ŝatus ekscii ion pozitivan pri ateismo, mi aĉetis la broŝuron de Archdeacon pro tiu espero, kaj bedaŭras mian monon. Do, gekamaradoj, mi ne povas alvoki al via kristana karitato, sed mi petegas, ke oni ne lasu min morti idiota : KIO ESTAS ATEISMO ? Jen la granda mistero de ateista propagando.

Se neniu povos respondi la demandon, mi ne povos riproĉi, ĉar mi ne pli povas diri, kio estas dikredo. Ne estas du dikredantoj, kiuj kredas al la sama Dio. Tial mi miregas, ke male de mi ateistoj ŝajne scias, en kio konsistas dikredo. Dikredo tia, kia oni prezentas ĝin en la ateista propagando, estas la motivo, pro kiu oni iras al la meso.

Ĉar ĉiu ajn instruita homo scias, ke ekzistas en la mondo

pluraj religioj, kaj ke en la kristana ekzistas pluraj eklezioj, mi demandas min, ĉu ateistoj komisias la verkadon de siaj propagandiloj nur al analfabetoj, aŭ ĉu ili havas la pripensitan intencon trompi la legantojn. Pro iu aŭ alia motivo, ateistaj propagandistoj enŝlosas siajn legantojn en tiu alternativo : aŭ iri al la meso, aŭ konvertiĝi al ateismo. La artefariteco de tiu alternativo tiom okulfrapas la neateistan leganton, ke li nepre demandas sin, ĉu la verkinto estas naivega aŭ malhonesta.

Krom ateismo kaj katolikismo ekzistas aŭ inventeblas miloj da kolektivaj aŭ individuaj sintenoj pri Dio, kiujn homo povas elekti. La diverseco de la kristanaj eklezioj estas konata de ĉiuj neanalfabetoj. Sed oni devas emfazi, ke en 1979 multegaj plej konvinkitaj kristanoj apartenas al neniu eklezio kaj kutime partoprenas en neniu religia ceremonio. Ŝajne ateistoj opinias, ke homo, kiu neniam eniras preĝejon, nepre devas esti ateisto. Kia nescio, aŭ ignoro ! En mia generacio, multegaj estas la homoj, kiuj forlasas ekleziojn pro kristanaj motivoj. Multegaj junaj kristanoj opinias, ke vera diservo ne estas ceremonio en preĝejo, sed aktivado por la paco, lukto kontraŭ malsato, devontiĝo en politika asocio, ktp, ktp. Vidante, ke la preĝejoj malpleniĝas, ateistoj ĝoje konkludas, ke kristanismo malaperas. Kia miskono de la afero! La realo estas, ke kristanismo eliras el la preĝejo surstraten, kaj tio estas fenomeno studinda de la sociologoj. Sed kutime ateistoj supraĵe konas la kristanan medion, tian, kia ĝi estis antaŭ 50 jaroj.

Ateistaj propagandistoj trompas la leganton, konfuzante ĉian ajn formon de dikredo kun katolika klerikismo, kaj ree trompas lin, konfuzante ĉian formon de ateismo kun liberpenso. Kompreneble, ekzistas ateistaj liberpensuloj. Sed kiel konfuzi liberpenson kaj ateismon, kiam ekde 1917 oni povas konstati, ke, por brutigi popolon, ateismo estas multe pli bona ŝtatreligio ol kristanismo ? Kompreneble, ĉiuj ŝtatreligioj predikas obeon al la ŝtato. Sed, en monoteista ŝtatreligio, la politika povo ne estas la supera valoro, ĝi estas pravigata nur per delegado. Dio estas supera al la kristana ŝtato. Male, en ateista ŝtatreligio, la dogmo, ke Dio ne ekzistas, signifas ke plej alta valoro estas la ŝtato mem. Neerarpova estas la Partio mem, ĝi scias ĉion kaj povas ĉion. Ĉar Dio estas supera al la ŝtato, kristano, kiu opinias, ke la ŝtatestro ne



estas reale delegita de Dio, aŭ ke li ne korekte plenumas la mision, kiun donis al li Dio, ne nur rajtas, sed eĉ devas ribeli kontraŭ la kristana ŝtato nome de Dio. Fakte tiaj ribeloj teologie pravigitaj ofte okazis en la historio de kristanaj ŝtatoj, ekzemple la milito de la kamparanoj de Germanio dum la tempo de la Reformacio. Sed sur kiu pli alta valoro ateisto povas ideologie bazi sian ribelon kontraŭ ateista ŝtato ? Oni ne povas ribeli nome de nenio ! Tiu neeblo klarigas, ke en ateistaj ŝtatoj ne nur ne malaperas kristanismo, sed prosperas la eklezioj (ĉefe en Polio), ĉar ili estas la nura organizita formo de opono al la ŝtato. Preĝo estas per si mem kontraŭŝtata ago, ĉar ĝi estas sinturno al aŭtoritato pli bona ol la Partio. Malfacile, kolektiva ribelo kontraŭ la ŝtato povas baziĝi sur liberecana individuismo. Cetere, la pluvivo de individuismo en marksista ŝtato estus miraklo. Kiel homoj aŭdintaj ekde la ŝtata infanvartejo, ke individuismo estas peko kontraŭ la kolektivo, povus fariĝi individuistoj ? Nuntempe, en ateistaj ŝtatoj, ribelantoj ne kredantaj al Dio bazas sian ribelon sur la deklaracio de UNO pri homrajtoj, kiu principe estas supera al la leĝoj de iu ŝtato. Ĉu tiu teksto enhavas en si forton sufiĉan, por ke sur ĝi oni bazu popolan kontraŭŝtatan ribelon ? Tion mi deziras al la orienteŭropaj kaj ĉinaj liberpensuloj.

Konsentite, ateistaj liberecanoj multe propagandas kontraŭ ateistaj ŝtatoj. Sed tute preteratentata estas la grava rolo, kiun ludas ateismo en la marksisma ŝtatismo. Katolikoj, kiuj perdas dikredon, malpli ofte fariĝas liberecanaj aktivantoj ol ĉefuloj de marksistaj organizoj celantaj starigi ateistajn ŝtatojn. Kiam tiuj homoj konvinkitaj per ateistaj broŝuroj estos realigintaj sian celon, ni povos daŭrigi nian debaton en koncentrejo, sed, karaj presintoj de ateistaj broŝuroj, almenaŭ mi povos fieri, ke pri tio mi ne respondecas.

Propagandon pri la krimeco de stalinistoj nepre liberecanoj tiel rebatus :
"Sed plej multaj ateistoj ne estas stalinistoj!" Se oni volas serioze propagandi por ateismo :
- aŭ oni diras ion pozitivan favore al ateismo ;
- aŭ oni kritikas, ne unu, sed ĉiujn formojn de dikredo, kiuj povas ekzisti, ĉefe tiujn, kiuj fakte ekzistas en

1979. Nu, en 1979, granda parto de la kristanoj inter 20 kaj 30 jaroj estas konvinkitaj kontraŭklerikuloj.

Sed ni supozu, ke Archdeacon havis nur tiun modestan celon : konvinki katolikojn, ke ili fariĝu liberpensaj. En tiu kazo, mi petas de la broŝurservo de SAT statistikon : kiom da katolikoj aĉetis la broŝuron, kaj, se hazarde estis kelkaj, kiom fariĝis liberpensaj post la legado ? Nur per tia statistiko oni povas scii, ĉu tiu broŝuro estas efika. Mi mem ne estis katolika, kiam Archdeacon verkis sian broŝuron, pro tio, ke mi ankoraŭ ne estis naskita. Eble tiam ĝi povus interesi katolikojn. Sed mi bone konis la katolikan medion ĝis la jaro 1975 proksimume, kaj plu havas geamikojn en tiu medio. Mia konvinko estas, ke katolikoj de mia generacio ne opinius tiun verkon ŝoka, tute ne, sed tutsimple tedega. Ĉar oni devas ion scii pri junaj katolikoj : ili tute ne interesiĝas pri katolikaj dogmoj, kaj multe malpli konas ilin ol ateistaj propagandistoj.

Tiu aserto, ke katolikoj de mia generacio tute ne konas la katolikajn dogmojn kaj neniel interesiĝas pri ili, eble surprizegos la ateistajn legantojn de "Laŭte!". Sed tio estas nek mensogo, nek ŝerco, nek klaĉo, tio estas la situacio, kiun mi spertis inter 1968 kaj 1975, kiam mi estis katolika studentino. La homoj, kiuj plej bone konas la katolikajn dogmojn, estas la ateistoj, ili ĉiam parolas pri katolikismo, dum katolikoj ne interesiĝas pri tiu temo. Jen la ĉefa bazo de nekompreno inter ambaŭ medioj.

Unu anekdoto por komprenigi al vi, kion mi volas diri. Iam, katolika amikino rakontis al mi tion : dum la meso, ŝia najbaro demandis ŝin : "Fraŭlino, ĉu vere vi kredas, ke ekzistas sesflugilaj keruboj ?" Ŝi miregis pri tiel stranga demando, kaj demandis sin, ĉu li estas freneza. Sed li aspektis tute serioza. Do ŝi eksplikis, ke tiaj komikaĵoj alportis iom da gajeco en la konstruado de la katedraloj, sed ke, de post la mezepoko oni ne plu konsideras tion serioza. Li rebatis : "Sed vi mem ĵus asertis, ke ekzistas sesflugilaj keruboj". Ĉar ŝi pli kaj pli miris, li montris al ŝi la tekston de la preĝo, kiun ĵus komune legis la ĉeestantaro, kaj fakte ĝi menciis la ekziston de sesflugilaj keruboj. Tiu preĝo estas eble 6 aŭ 7-linia, kaj laŭ miaj kalkuloj pri la aĝo de mia amikino kaj ĝia ofteco en la liturgio, mi taksas, ke ŝi aŭdis ĝin 200-foje. Nepre ateisto konkludus, ke tiun kerubon



oni vidas tiel bone, kiel elefanton en koridoro. Sed ŝi devis konfesi, ke ŝi neniam rimarkis tiun beston en la preĝejo, kaj aldonis, ke probablege la aliaj ĉeestantoj de la meso ne pli ol ŝi kredas pri ĝi. La viro klarigis, ke li estis edukita ateiste, kaj eniras tiun preĝejon pro nura scivolemo pri tio, kio okazas tie.

La ekzisto de sesflugilaj keruboj certe ne estas tre grava punkto de la katolikismo. Sed sama neatentemo koncernas ankaŭ bazajn dogmojn de la katolikismo. Dum jarcentoj militis kaj bruliĝis homoj pro la demando, ĉu vere la pano kaj la vino transformiĝas al la korpo kaj sango de Jesuo. Jes, diras la katolikoj ; ne, diras la protestantoj, kaj pri tiu punkto ili longtempe interbuĉis. Do mi iam demandis katolikan amikinon : "Ĉu ci povas klarigi al mi, per kiu kemia procedo pano kaj vino transformiĝas al la korpo kaj sango de Jesuo ?" Reago : "Kiu ankoraŭ diris al ci tian stultaĵon ?" - "La Sankta Eklezio katolika". "Sed, diris ŝi, tion oni devas kompreni simbole." - "Tute ne, mi rebatis, simbole komprenas tion la kalvinistoj, sed ne la katolikoj". Ŝi asertis, ke ne eblas, ke la Sankta Eklezio instruu tian stultaĵon, kaj ke mi ankoraŭ volas moki pri ŝia katolika praktikado, false asertante, ke ŝi kredas al stultaĵoj. Mi memorigis ŝin pri la kantoj, kiujn ni kantis pri tio dum nia infanaĝo, pri la katekismo, ktp, ktp. "Jes, ŝi diris, mi bone memoras, sed tion oni devas kompreni simbole." Rezignante ŝin konvinki, mi diris ŝerce, ke ŝi ne timu, ĉar certe ankaŭ protestantoj iras al la ĉielo. Tiam la papo malpermesis interkomunion kun nekatolikoj, kiuj ne kredas al la reala ĉeesto de Kristo en la pano kaj vino. Ĝojinde ne alvenis ĝis la ekleziestra kapo la ideo malpermesi tion al katolikoj!

Tio estas nur du ekzemploj pri la nescio de katolikoj pri la instruo de sia eklezio. Ofte junaj katolikoj kredas, ke la papo povas erari, indiferentas pri la kreado, dubas pri la virgeco de Maria, tute ne kredas al mirakloj, aŭ almenaŭ absolute indiferentas pri ili, kaj firme kredas, ke infero ne ekzistas. Se oni demandas ilin, al kio utilas dikredo, ili respondas ridegante, ke dikredo utilas al nenio.

Do, ateistaj kamaradoj, se iam en katolika preĝejo vi vidas traflugi sesflugilan kerubon, ne verku broŝuron pri ĝia sekso, ĉar nur ateistoj estas rimarkintaj ĝin, kaj ka-

tolikojn via broŝuro tedegus.

Tiu nescio de katolikoj estas konsekvenco de kutimoj eklezioj. Ekzemple, la tekstojn pastroj deklamas per tiel monotona kaj solena tono, ke la fidelularo estas impresata de la sankteco de la teksto, sed ne enkapigas ĝian signifon. Sed ĉefe, francaj katolikoj estas informataj pri sia religio inter sia 8a kaj sia 12a jaro. T.e., ke katoliko scias pri katolikismo nur tion, kio estas klarigebla al 12-jara infano, minus la parto de la katekismo, kiun li forgesis ekde la tempo de sia komunio. Nu, Freinet-instruistoj bonvolu doni al mi konsilojn pri la taŭga metodo por klarigi (!) al 8-jara infano la precizan signifon de la frazo "La Filo estas lumo naskita el lumo, dio naskita el dio, generita sed ne kreita, kaj samnatura kiel la Patro", kiun ĝi aŭdos 52-foje jare dum 4 jaroj antaŭ ol solene aserti, ke pri tio ĝi kredas.

Tamen, ne kredu, ke tiu nescio pri sia asocio estas specifa de la katolika eklezio. Ekzemple, al la organizantoj de la kongreso de Rijeka (*) mi proponas tiun tekston : ĉe la alveno de ĉiu SAT-ano en la kongresejo, oni donu al li paperon kaj sidigu lin ĉe aparta tablo postulante : "Listigu ĉiujn punktojn de la statuto de SAT, kaj poste mi donos al vi la kongresan tekon". Kiom da kongresantoj restus ?

Se ili ne konas la katolikajn dogmojn, kaj tute indiferentas pri ili, kial tiuj junuloj estas katolikoj ? Nu, inter la homoj edukitaj katolike en sia infanaĝo oni povas distingi 3 kategoriojn :

- tiuj, kiuj ĉe la katekismo atendis oscedante la horon de la supo, t.e., la granda plimulto. Tiuj, fariĝinte plenaĝaj, eniras katolikan preĝejon por geedziĝi, baptigi siajn infanojn kaj entombigi siajn gepatrojn. Ili estas la plimulto, sur kiu baziĝas (falsaj) statistikoj pri la katolikeco en Francio aŭ de aliaj landoj.
- la filozofoj, kiuj kredas, ke kristanismo konsistas el dogmoj. Tiuj trapasas sian tutan adoleskaĝon studante la katolikajn dogmojn por provi racie kompreni ion de sia religio. Tiuj tre junaj homoj estas la nuraj katolikoj, kiuj povas aĉeti la broŝuron de Archdeacon. Fariĝante plenaĝaj, ili komprenas, ke katolikaj dogmoj estas stultaj, fariĝas ateistoj kaj financas per sia mono la kontraŭkatolikajn broŝurojn. La plej kompetentajn pri studo de dogmoj oni retrovas ĉe altrangaj postenoj de la marksistaj asocioj.
- la mistikuloj, kiuj jam kun 8 jaroj sciis, ke kristaneco ne konsistas el dogmoj. Tiuj, fariĝinte plenaĝaj, restas tiaj, kiaj ili estis dum sia infanaĝo, t.e. pli kaj pli disvolvas personan rilaton kun Jesuo.

Granda parto el ili, konstatante, ke Jesuo estis kontraŭklerika, forlasas la eklezion, ofte por aktivadi politike (tio estas mia persona kazo). Sed, ĉe aliaj, la familia medio trudas restadon en la katolika eklezio, kaj tiam ili opinias, ke ĝin oni povas pli bone reformi, se oni estas interne (iluzio komparebla al tiuj, kiuj soldatservas por kontraŭmilitiste propagandi en la armeo). En tiu kazo, partopreno en la katolika meso estas formo de omaĝo al la personeco de tiu homo, kiu estis krucumita de pastroj post prediko pri universala amo. Tiu sinteno estas iom kontraŭdira, sed bonvolu rimarki, ke oni ŝanĝis la liturgion, tiel ke reale katolika meso nun entenas mistikan celebradon de iu homa frateco iom skoltece konceptita, sed tute sincere ligita kun religieco ĉe tiuj junuloj.

La nura dogmo, kiun konas tiuj junuloj, ĉu ili partoprenas en la katolika meso, ĉu ili opinias, ke pastroj estas kristkrucumemuloj, estas : Dio estas amo. Se oni demandas ilin, kio estas kristanismo, ili respondas : "Tio estas la amo al la proksimulo". Tion ili sincere kredas, kaj nuntempe ĉiuj religiaj kantoj temas nur pri tio. Broŝuro kontraŭkatolika, kiu ne temas nur pri la dogmo, ke Dio estas amo, ne interesas ilin, ili ne ŝokiĝas, sed tediĝas pro tiu seninteresa polemiko, kiu tute ne koncernas ilin.

Jacqueline (daŭrigota)

---

* La verkintino efektive menciis la kongreson de Swanwick, sed ĉar ĝi jam okazis, ŝia propono certe validas por Rijeka.(red)

---

La broŝurservo - dankas la foli-kribrantaron, kiu helpis
************** okaze de la E-semajno en Bovilo !
- informas pri la projekto - iom post iom plenumota ĝis fino de 1980 - reeldoni la plej mendatajn el la elĉerpitaj broŝuroj ("El la kara infaneco", "La Kvina Evangelio", ktp).
- plu bezonas helpon por diskonigi kaj disvendi la jam ekzistantan broŝurstokon !

Kribo

Nur por kiuj kapablas legi la francan !
************************************

* Ĉe la "paralela" eldonejo : "Le Vent du Ch'min", 5 bis, rue Rolland Vachette, F 93200 ST DENIS , du interesaj eldonaĵoj :

- unue : "La feuille" de la "Ekster-ulo" Zo d'Axa. Faksimilo de malgranda gazeto, kiu de 1898 ĝis 1899 verve kaj vigle skurĝis la juĝistojn, la posedantojn, la militistojn, la infanajn punlaborejojn, la politikistojn, sed ankaŭ la laboristojn, kiuj estas balotantoj kaj honestaj konsentantoj pri sia sorto.
La gazeto estas ilustrita de la plej famaj desegnistoj de la "bela epoko" : Stenlein, Willette, ktp. Antaŭparolo de Leo Campion kun biografio de Zo d'Axa.

- due : La Verkoj de Gaston Couté : poeto kaj kabaredisto de la komenco de la XXa jarcento, aŭtoro de la libro "La Chanson d'un gas qu'a mal tourné" kaj kunlaboranto al "La Guerre Sociale", kontraŭmilitista gazeto. Lastatempe oni dediĉis TV-elsendon al li kaj junaj kantistoj verkis pri tiu poeto, kies verkoj restis longtempe forgesitaj.

J.G.

* Por ricevi franclingvajn kovertojn kontraŭnukleajn, kontraŭmilitistajn, ktp, nova adreso : L.I.R., BP. 95 ,
F 85000 LA ROCHE SUR YON
Sliparo de la gazetoj kontraŭinformaj por Francio (laŭ departementoj), Belgio kaj Svisio (franclingve) :
Doc-Presse, Fougère Olivier, 5 rue des Juifs,
F 18000 BOURGES.

**********************************************************

El la dua kolekto da "Esperanto-gramoj" de Antoni MADEJ :

Facilaj konversacioj

Multaj babiloj facilaj
estas treege sterilaj.

Al verdsangaj samideanoj

Ĉi tion sciu vi verdaj patriotoj
Idisto tute ne estas idioto !

Nihil novi...

Poem' pri amo    Ĉiam la samo



Nia felietono : TRA LA MONDO PER BICIKLO...
************

La manĝoj - tion mi plej bone memoras - konsistis ĉefe el fritaĵoj. Efektive, sunfloro kaj tabako estas, kun vito, la ĉefaj riĉaĵoj de la fekundaj valoj. Tiam oni tie manĝis ankaŭ paprikofruktojn kaj tomatojn.

Ni devis trairi SIMFEROPOL-on por plenumi la neeviteblajn administraciajn formalaĵojn, kiuj postulis 2-3-tagan halton. De tie ni celis SEBASTOPOL-on. Subite, la pejzaĝo ŝanĝiĝis kvazaŭ pro frapo de feina stango. La vojo fariĝis pavimita, borderita per belaj arboj same kiel en la Marsejla regiono. La olivarbo kaj la vito alkroĉiĝas al la flankoj de l'montetoj fronte al la maro. Ni malsuprenbiciklis senfinan deklivon kaj... subite aperas sub niaj okuloj la haveno, flag- kaj florornamita, kvazaŭ estus festega tago. Ĉiujn boatojn - kaj ili estas multegaj - ornamas ŝnuregoj, sub kiuj pendas miriadoj da flagetoj kaj lampetoj. La maro estas helblua, la urbo ĉe niaj piedoj aspektas multe malpli detruita ol ODESSA. Vilaoj, kiel en Francio, kroĉiĝas al la montetaj flankoj kaj laŭlonge de la vojo.

Kiel kutime, atendis nin esperantistoj, kies delegito nomiĝis Sinjoro Chapiro. La ĉefaj klubestroj estis virinoj kaj fraŭlinoj kaj inter ili, eksedzino de "nobelulo". Por pluvivi ŝi honeste komercis siajn ĉarmaĵojn, kvankam ŝi flue scipovis la francan, la germanan, la rusan, kaj kompreneble, esperanton. Mistero de la homa destino kaj postrevolucia dekadenco ?
Ni vizitis la urbon kaj ties ĉirkaŭaĵon, interalie la panoramon de la fama sieĝo de Mac-Mahon. Cirkloforma muzeo staras meze de la batalkampo. Tie grandegaj freskoj pripentras epizodon de tiu batalo, kio al mi, Franco, faris memorindan impreson.

(...) Ni forlasis Sebastopolon per kornica vojo preskaŭ ĉiam laŭlonge de la maro. Unuan kaj lastan fojon en Sovetio mi trovas veran ŝoseon, pontojn, sume "francan" vojon, kaj eĉ - ho kulmino de l'komforto! - proksime de Jalta, gudritajn ŝoseojn. Jalta kaj ties tutapuda regiono estas la rusa Lazura Marbordo. Antaŭ la revolucio, Jalta estis la rendevuejo de la rusa aristokrataro, kiu lasis tie belegajn vilaojn, palacojn, kazinojn. La soveta ŝtato transformis ĝin en ripozejon por la sovetaj laboristoj kaj eĉ por ia "elito" el fremdaj laboris-

toj. Tial, nun frekventas ĉiujn tiujn palacojn kaj ties parkojn amaso da popolanoj rekoneblaj pro siaj naciaj kostumoj sur la strato kaj pro sia haŭto sur la strando ankoraŭ vizitata en tiu sezono. Nur mallongegan restadon ni havos en tiu ĉi rava loko, ĉar ni ŝatus transiri Kaŭkazon antaŭ la severa vintro.

(...) Unu el la plej mirindaj aventuroj de mia tuta vojaĝo ni estis travivontaj la morgaŭon. Ĉirkaŭ la 15a, la postan tagon, ni surŝipiĝis kun niaj bicikloj, sub la huraoj de amaso da gapemuloj. Principe la vojaĝo devus daŭri unu horon, ĉar la markolo estas mallarĝa, ĉirkaŭ 10-kilometra. Ni ĵus forlasis la bordon, kiam nin trafis tempesto. Ni estis manĝantaj en la manĝokajuto. Neniam en mia vivo mi suferis tian marmalsanon, ke la ŝipistoj devis transporti min sur la ferdekon sur ŝnuramason, kie mi povis "komforte" vomadi kaj tordiĝi. Dume, Paŭlo, nesentema al marmalsano, plu diskutadis kaj fumadis kun la ŝipanaro. Spite miajn neelteneblajn singultojn, mi havis la forton observi kaj ĝui la tutan poezion de la malbridita likva elemento. La ferdekon vere mergis akvomontoj, kiuj estus min forportintaj, se mi ne estus droninta funde de dika ŝnurvolvaĵo. Mi estis ĉe la kapo de la ŝipaĉo kaj mi nete sentis la egajn ondojn, kiujn fendis la steveno. Kompreneble, mi dronis en salakvaj banoj kaj la ŝipistoj komprenigis al mi, ke - eble paradokse - la ferdeko estas la plej taŭga parto de l'ŝipo por rezisti la marmalsanon.

Pro la tempesto la vojaĝo daŭris pli longe ol antaŭvidite, sed fine, ĉirkaŭ la 17a, ni elŝipiĝis ĉe la ekstremaĵo de sabloplena kaj senhoma duoninsulo, kiun tute trabalais la marŝaŭmo. Mi estis en kompatinda stato kaj restis al ni apenaŭ unu horo da taghelo por atingi la plej proksiman vilaĝon.

Tute same kiel en la Perekop-markolo, ni biciklis en "luneca" pejzaĝo : akvo, sablo, nebulo, orientiĝante hazarde meze de lageto kaj de sablomontetoj. Kroma malbonŝanco : maldense ekpluvis kaj fine elirinte el la sablo ni atingis argilecan stepon, sur kiu ni ne povis rapide antaŭeniri. Baldaŭ ni devis eĉ piediri, tiel gluiĝema fariĝis la koto... La nebulo, la pluvo, la noktiĝo, kaj nenio, neniu vilaĝspuro antaŭ ni. Fine malhela nokto falis meze de la pluvo - ja, pluvego! Ne eblis pluiri kun niaj bicikloj. Cetere, kien iri ? Nur la vojtruoj montris, ke ni troviĝas sur vojo.

(daŭrigota)



SUNO EN MALSANULEJO

Sunas malantaŭ stangoj kaj larmas mia vizaĝo
Blankas virinoj,
odoras etero,
blankas, blankas, blankas,
ĉio blankas,
lito, seĝo, muro,
ĉio blankas,
blankas ankaŭ viroj
kaj virinoj,
uniforme blankas,
sen iu ajn koloro,
administracie blankas.

En mi estas freneza deziro
preni penikon,
ĉion farbi,
ĉion kolorigi,
blue, flave, ruĝe,
viole, brune, oranĝe,
lilake, ribe, citrone,
lazure, smeralde, sune.

Blankas, blankas, ĉio blankas,
sed en mi,
interne de mi,
en tiu sango, kiu kuras en miaj vejnoj,
suno, koloroj,
mento, timiano, rosmareno,
kamparo, aero, ĉielo,
ĉio fluas en mi,
per ĉiuj eroj de mia korpo,
ĉio alfluas al mia tuta esto,
vivo, fajro, fluo,
ĉio kuras en mi.

Blankas, blankas, blankas ĉio,
Ne gravas tio, ĉar koloro estas interne de mi.
Vi estas stangoj, blankaj virinoj,
kaj estas mi suno,
ĉar vi odoras je etero kaj morto
dum mi VIVAS.

Jacqueline.

Noto: En tiu teksto, mi provis esprimi miajn memorojn el la tempo, kiam mi estis enŝlosita en psikiatriejo, por komuniki ilin al Roger KNOBELSPIESS*, kiu tiam ĵus eliris el kvartalo por alta sekureco. Mi ne scias, ĉu la mallibereja administracio donis al li tiun tekston. Mi supozas, ke ne.

* Nova adreso de R.KNOBELSPIESS, n°3593, 10 quai la Courtille, 77011 MELUN

---

Directeur: Simonet. Imprimeur: Baudé, 47340 Laroque.CP.58651

V I V O en la E S P E R A N T O - G R U P O J
**********************************************

## * A V I N J O N O

Post la kongreso, la 12an de junio, OKK-anoj de la 34a SAT-Amikaro-Kongreso kaj kongresintoj kunvenis. Estis decidita starigi Vaŭkluzan Federacion, kies fondintoj estas la grupoj de AVIGNON kaj CARPENTRAS.

En "Maison des Jeunes et de la Culture", Croix des Oiseaux, okazos informa kunveno ĵaŭdon, la 27an de septembro '79, je la 18a.

Du kursoj malfermiĝos venontan aŭtunon :
- lunde, je la 18a, ekde la 1a de oktobro (unuagrada);
- ĵaŭde, je la 18a, ekde la 4a de oktobro (duagrada).

Kaj monata renkonto okazos ĉiun duan ĵaŭdon (11/10 kaj 08/11).

En Kastelo de la Barbière okazos Zamenhofa tago ekde la 10a, dimanĉon 16an de decembro. Ĉiuj esperantistoj de la proksimeco estos bonvenaj okaze de tiu festa tago.

## * S O R G U E S

En "Maison des Jeunes et de l'Education Permanente" estos informa kunveno mardon la 25an de septembro '79, je la 18a.

Sekvos kurso en tiu ejo. La gvidanto estos la ĉarma ŝoforo de la pasinta kongreso en Avinjono ! La sukceso estos certa!

## * Ĝ I R O N D I O

Nia esperantista laborplena jaro finiĝis en LE CANON - Cap Ferret, kie ni kunvenis la 23an de junio. Ĉeestis 16 personoj. Unue, de la 11a horo matene ĝis la 12a kaj duono, estis labortempo en la tutnova urbodomo. Ni bilancis pri nia partopreno en kermesoj de EYSINES kaj Bordoza Parko... kelkaj kolektitaj adresoj... eble lernontoj ?..

Pri nia kandidatino por SWANWICK : Dominique Vidal. Finfine ŝi rifuzis, ĉar ŝi trovis someran laboron. Do, venontjare ni vidos...

Pri la venonta jaro kaj ĉefe pri la organizado de niaj ĉiumonataj kunvenoj estas propono por trovi "novan" formon, kun tri momentoj :

1) informado
   a) E-varbado, se estos publiko.
   b) grupaj aferoj.

2)parolado por ĉiuj, ekzerciĝi paroli, per lumbildoj, ludoj, historietoj, temaj prelegoj, rakontoj, ktp...
3)kantoj, poemoj... eĉ elpensotaj! La celo povus esti registri kasedon por sendi al alia grupo.

Post tiu intensa laboro, ni veturis ĝis la domo de kamaradino, kiu estas lernantino de H. Chaillot kaj kies edzo estas ostro-bredisto. Tie ni englutis dikajn kaj bongustajn ostrojn; kaj blankan vinon, kompreneble. Estis ege agrabla tagmanĝo ekstere. Poste ni piediris tra la dunoj ĝis la Oceano, sed pro la malvarmo de la vento kaj de la akvo ni nur rigardis, rapide, la allogajn ondojn.

Nun por la estonteco :

En Septembro : ni kunvenos en CENON-Palmer, Maison pour Tous, la 18an je la 19a horo. Tre grava kunveno, ĉar ni elektos novan komitaton.

En Oktobro : la 20an je la 11a horo (matene) en la kampara bieneto de ge-DEMONTOUX, La Burthe, VILLANDRAUT. Ĉiuj kunportu sian propran tagmanĝaĵon sed... ĵusrikoltitan vinon surloke ni trovos. Ĝis!

Joël.

* E-tago ĉe "Instituto de Mondanistaj Studoj" - Kastelo "La Lambertie" , Pineuilh, apud STE FOY LA GRANDE (Ĝirondio)
*******************************************************

"La Lambertie" estas bieno situanta en Pineuilh apud Ste Foy-la-Grande en Ĝirondio (Francio). Tie sidas la "Instituto de Mondanistaj Studoj", kiu, impulsate de Guy Marchand, organizas studsesiojn kun partopreno de fakuloj por esplori la plej gravajn problemojn starantajn antaŭ la homaro. En tiu kadro okazis la 12an de aŭgusto Esperanto-tago, al kiu alvokis partopreni "Laŭte" (nroj 19 kaj 20). Krom gekdoj VOLPELIERE, geresponsuloj de la E-Registrolibro de la Mondcivitanoj, kaj Dro ALBAULT, kiu prelegis pri la temo "Ĉu monda kulturo estas ebla ?", 17 geesperantistoj el sudokcidenta parto de Francio ĉeestis (departementoj 24,32,33,47 kaj 82), sidante kun la mondcivitanaj sesianoj en la ĉefsalono de l'kastelo. Post la lerta prelego de Dro ALBAULT - kiu komence uzis esperanton por kutimigi la mondcivitanojn al la universala lingvo - okazis diskutado, kiu montris la grandan interesiĝon de ĉiuj ĉeestantaj mondanistoj por esperanto. Jam multaj el ili lernas la lingvon. Plej fervore S-ino GAYMARD-ROLLET subtenas tiun enkondukon de esperanto en medion, kiu plej bezonas ĝin (duono de la elspezoj necesaj por organizi la MC-kongreson en Parizo utilis por pagi la tradukistojn!).

Posttagmeze okazis debato en esperanto pri mondanismo. Ni konstatis kiel interdependaj estas la aferoj de universala lingvo kaj de tutplanedismo. Tio espereble nasku ankoraŭ pli viglan kunlaboradon inter tiuj du movadoj !

Adreso utila por peti sian registriĝon kiel mondcivitano :
Internacia Esperanto-Centro de la Mondcivitanoj
8 rue Rouget de Lisle, F 30000 NIMES (Francio). Kribo

* A Ĝ E N I O : Esperanto-tablo en liberecana festo kaj alia
*********** en ekologia manifestacio en junio ebligis informi dekojn da personoj. Vendiĝis i.a. 3 kurslibroj, 5 inicbroŝuroj.

* B E A U V I L L E (Lot-Garonio)
******************

Mia tria kaj lasta restado en Bovil'

Ĉar la restado en Bovil' en 1978 estis grandega fiasko, mi tre timis partopreni en nova aventuro tie. Tamen, legante en Laŭte nº19 : "La pasintjara partoprenantaro deziris pli zorge difinitan organizadon (ĉefe pri la diversaj taskoj necesigataj de la kolektiva vivo) kaj konkretan aktivadon", mi naive kredis, ke okazos ĉi-foje decido de la ĉeestanta kolektivo, ĉar, kvankam laciga, ĝi klare montriĝis necesa. Poste, retrankviligis min la promeso de Laŭte nº20 "Al ĉiu ni aparte skribos, por ke ĉiu sciu, kion la ceteruloj proponas". Do mi alvenis en la muelejo de Bovil' sabaton la 28an de julio, tute ne sciante, kion proponas la ceteruloj, sed mi tuj vidis nigran tabulon, kie estis skribite per blua kreto, ke estas programo por tiu sabato, interalie "starigo de l'semajna programo". Mi estis do tute retrankviligita, kaj atendis, ke ĉiuj kunsidu ĉirkaŭ tablo, ke ĉiu individuo esprimu siajn dezirojn por la semajno, kaj ke el individuaj sugestoj naskiĝu per kolektiva diskutado senestreca iu komuna programo, kiel skribis la neorganizanto en Laŭte kaj sur la nigra tabulo.
Mi volis sugesti, dum tiu organiza kunveno, ke por la materiaj taskoj oni faru tabelon menciantan klare, kio estas por fari, por ke ĉiu povu sin anonci por tion fari.
Kiel kutime, tiu organiza kunveno neniam okazis, kaj, kiel kutime naskiĝis el aro da individuaj spontaneoj neniu kolektiva vivo, kio estas nur la plej elementa logiko. Okazis nek

V I V O en la E S P E R A N T O - G R U P O J
******************************************************

## * A V I N J O N O

Post la kongreso, la 12an de junio, OKK-anoj de la 34a SAT-Amikaro-Kongreso kaj kongresintoj kunvenis. Estis decidita starigi Vaŭkluzan Federacion, kies fondintoj estas la grupoj de AVIGNON kaj CARPENTRAS.

En "Maison des Jeunes et de la Culture", Croix des Oiseaux, okazos informa kunveno ĵaŭdon, la 27an de septembro '79, je la 18a.

Du kursoj malfermiĝos venontan aŭtunon :

- lunde, je la 18a, ekde la 1a de oktobro (unuagrada);
- ĵaŭde, je la 18a, ekde la 4a de oktobro (duagrada).

Kaj monata renkonto okazos ĉiun duan ĵaŭdon (11/10 kaj 08/11).

En Kastelo de la Barbière okazos Zamenhofa tago ekde la 10a, dimanĉon 16an de decembro. Ĉiuj esperantistoj de la proksimeco estos bonvenaj okaze de tiu festa tago.

## * S O R G U E S

: En "Maison des Jeunes et de l'Education Permanente" estos informa kunveno mardon la 25an de septembro '79, je la 18a.

Sekvos kurso en tiu ejo. La gvidanto estos la ĉarma ŝoforo de la pasinta kongreso en Avinjono ! La sukceso estos certa!

## * Ĝ I R O N D I O

Nia esperantista laborplena jaro finiĝis en LE CANON - Cap Ferret, kie ni kunvenis la 23an de junio. Ĉeestis 16 personoj. Unue, de la 11a horo matene ĝis la 12a kaj duono, estis labortempo en la tutnova urbodomo. Ni bilancis pri nia partopreno en kermesoj de EYSINES kaj Bordoza Parko... kelkaj kolektitaj adresoj... eble lernontoj ?..

Pri nia kandidatino por SWANWICK : Dominique Vidal. Finfine ŝi rifuzis, ĉar ŝi trovis someran laboron. Do, venontjare ni vidos...

Pri la venonta jaro kaj ĉefe pri la organizado de niaj ĉiumonataj kunvenoj estas propono por trovi "novan" formon, kun tri momentoj :

1) informado a) E-varbado, se estos publiko.
b) grupaj aferoj.